## ĈAPITRO VII

### TETRINKADO ĈE FRENEZULOJ

JEN sub arbo antaŭ la domo ŝi vidis tablon; ĉe la tablo sidis, tetrinkante, la Martleporo kaj la Ĉapelisto; ankaŭ inter ili sidis Gliro, kiu dormas profunde. La du aliaj apogis sur ĝi la kubutojn, kaj babiladis ĉirkaŭ ĝia kapo. "Tre malkomforte por la Gliro" pensis Alicio "tamen, ĉar ĝi dormas profunde, ĝi kredeble ne sentas la malkomforton.

Kvankam la tablo estis granda, la ĵus priskribita trio amasiĝis en unu angulo. Ekvidinte Alicion, ili tuj kriis unuvoĉe. "Ne pli da sidlokoj, ne pli!"

"Jen *kelkaj*" diris Alicio indignante, kaj sidigis sin en granda apogseĝo ĉe unu fino de la tablo.

"Prenu da vino" per mokafabla voĉo alparolis ŝin la Martleporo.

Alicio per vigla serĉrigardo esploris la tutan tablon, kaj vidis sur ĝi—krom teaĵoj—nenion.

"Mi ne vidas vinon" ŝi diris.

"Nek mi" diris la Martleporo.